

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 5-an de oktobro
M.-Antoinette prelegos ...
- Lu, la 2-an de novembro
La Fantomoj de la lago ĉeestos.
- Sa, la 12-an de decembro
Zamenhofa Festo.

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Lunde, la 7-an de septembro je la 20-a en Espace Dickens en Laŭzano Elisabeth Renaud prelegos : *Restado ĉe la nomadoj «Tuva» de Mongolio.*

La 20-an de junio, 15 el niaj membroj partoprenis la jaran ekskurson. Ni vizitis matene la **Oleo-Muzeon de Severy**, kie ni spektis la manieron premi la junglandojn.

Ni tagmanĝis kantante: **O SOLE MIO** ĉar tiel nomiĝas la restoracio.

Je la 14-a, ni alvenis al la **Kastelo de La Sarraz** por viziti la **Ĉevalan Muzeon**; apude, la kastelo ne estas vizitebla, ĉar en tiu momento ĝi estas renovigata.



Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto: Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario: François Randin (076 369 29 17)
Kasisto: Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro: Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Babiladaj Rondoĵ

Ambaŭgrupe je 19h00:

Vendrede, la 11-an de septembro
ĉe Knud kaj M.-Antoinette
av. des Alpes 150 en Montreux
021 961 38 56 - 079 210 97 75



Vendrede, la 25-an de septembro
ĉe Francisko en Laŭzano
076 411 14 55



KASTA FESTO (18h00)
Sabate, la 26-an de septembro,
ni plezure projekcios nian filmon:

“LA SEKRETA VILAĜETO”
al niaj amikoj en Ĝenevo.
Venu interparoli kun ili pri via
sperto kiel aktoro.

<https://eventaservo.org/e/kastafesto24>

**LA LAŬZANA
ESPERANTO-SOCIETO
prezentas sin ...**

estas la titolo de nia filmo, kiu ricevis la 3-an premion de la *Esperanto-Etfilm-Konkurso* de SES, kaj kiu kandidatos ankaŭ al la publika premio atribuota sabate la 17-an de oktobro en Zuriko (*Centro Karl der Grosse*)

VENU MULTNOMBRAJ

Karlo de Edmond Privat

deksepa ĉapitro: *Studento kaj poeto*

		1		5		6	
		6	3			8	
			2			5	7
3				2			
	2				4		
4		8		1			
1				6	3		4 9
8							
		9					5



	7		4	8			9	5
			9					
4		8		1	2			
	8	1					6	
2	4				5			7
							5	2
		3		5	8	1		
			7	9				



Ĉe la fino de siaj gimnaziaj jaroj, Karlo bone sukcesis sian lastan ekzamenon. Lia patro decidis, ke li forveturu studadi en Heidelberg. Tie li pasigis unu jaron; sed malgraŭ la gajeco de la studentoj kaj la beleco de la urbeto, Karlo ne havis tre ĝojan vivadon. Li pli kaj pli fariĝis revema. Dum la aliaj drinkadis bieron kaj petoladis tra la stratoj, Karlo trankvile sidadis en sia ĉambro.

Li havis bonan brakseĝon, kaj, en la malvarmaj vesperoj, li tie sidis ĉe la fajro, pripensante aŭ legante. Li ofte verkis versaĵojn. Ankaŭ li skribis longajn leterojn al sia amiko Janko, kiu estis en Bruselo, studanta leĝosciencan. Karlo aŭskultis en Heidelberg kelkajn kursojn pri natura scienco, biologio kaj psikologio. Li decidis, ke proksiman jaron li komencos studadi medicinon. Por tio li ankaŭ veturis Bruselon, kiam estis finita lia jaro en Heidelberg.

En Bruselo, pli gaja estis por li la vivado. Tie li

renkontis sian amikon Jankon kaj ankaŭ alian kunliceanon Laminde, kiu ĵus venis el Anglujo kaj studadis literaturon. La influo de Janko estis tre bona al Karlo, ĉar tiu amiko estis ĉiam energia kaj gaja. Li kondukadis Karlon al la juĝejoj, al politikaj kunvenoj, al sociaj kaj sciencaj paroladoj. Kiel antaŭe, li multe lernigis al sia revema amiko.

Laminde estis neriĉa junulo. Li devis perlabori por vivadi kaj studadi. Li donis lecionojn, li eĉ faris paroladojn pri la angla literaturo, li verkadis por gazetoj. Dank' al li, Janko kaj Karlo kelkfoje ricevis senpagajn teatrobiletajn, havigitajn de la redakcio de ĵurnalo, por kiu Laminde ofte skribis artikolojn.

Kiel Janko, Laminde multe kuraĝigis Karlon per sia vigleco. Kvankam li studadis medicinon, Karlo ĉiam pli interesiĝis je la literaturo kaj arto. Ambaŭ liaj amikoj tre incitis lin, ke li publikigu kelkajn el la poemoj, kiujn li verkis. Sed

Karlo dum longa tempo estis tro timema. Fine li elektis tridek el ili kaj eldonis elegantan volumeton kun modernarta kovrilo kaj longe serĉita titolo: "*Oraj Flugiloj*". La unua versaĵo estis la jena:

Lasta flugo.

*Vi kien flugas, papilio,
Tremante kaj rapide?
Ĵam mortis rozo kaj lilio,
Kaj venas frost' perfide.*

*Flugiloj viaj kvazaŭ lampo
Brietas en nebulo:*

*Vi kion serĉas tra la kampo,
Perdita somerulo?*

*Dezertaj estas la ĝardenoj
Kaj vana l' amo via.
Skeletoj ŝajnas la verbenoj
Sub laŭbo senfolia.*

*Vi kial flugas en malvarmo
Tra flora la tombejo?
Sur ĉiu loko pluva larmo
Nun restas en herbejo.*

*Silentas ĉiuj en la nestoj,
Kaj svenis bonodoroj;
Plu ne batalos vi kun vespo
Pri la floretoj koroj.*

*Jen restas nur en kampo vasta
Velkinta krizantemo,
Sur kiu via kiso lasta
Mortigos vin en tremo.*

Intervjuo de Elisabeth Renaud, fidela membro de LES

(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfaze.*

Mi naskiĝis post la dua mondmilito kaj vivis miajn infanjarojn en Alzaco. Mi studis por iĝi flegistino.

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

Mi ne plu rememoras, kiam mi aŭdis pri ĝi sed mi adoleskantis.

De ĉiam mi revis studi tiun lingvon tamen mi atendis emeritiĝi.

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

Fine de 2015 mi vizitis la esperantistan ekspozicion de LES en la Palud. Tuj Karlota proponis aligi min al la venonta kurso de Francisko en januaro.

- *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

Miaj infanoj malŝatas mian novan okupiĝon. Plie ili nepre malpermesas al mi paroli esperanton al miaj nepinoj. Miaj geamikoj diras, ke estas kapricaĉo de mi, ĉar tiu lingvo tute malutilas.

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Neniu. Nur dum la renkontiĝoj aŭ el la reto nombras miaj konatuloj esperantistaj.

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

Mia unua UK okazis en 2018 en Libono (Portugalia). Mi ne vere ŝatis ĝin, ĉar por mi ĉeestis multe tro da personoj. Mi konfesas ankaŭ, ke mi tute ne pretiĝis; mi preferas partopreni staĝojn.

